







Thomas Keneally, 1935-
Aŭstralia verkisto



Esperanto sub la Suda Kruco

Majo-Junio 2004
Numero 69 (Volumo 12, no.3)



Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 69 (volumo 12, numero 3), Majo-Junio 2004

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

Telefono: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝte: sudakruco@sudakruco.org

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St, Redfern, NSW 2016, Aŭstralio.

E-poŝte: libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio.

E-poŝte: hazgreen@twmba.net

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de Esperanto sub la Suda Kruco: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso: sudakruco@sudakruco.org; vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mb aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

Sur la Kovrilo

Thomas Keneally (1935-) estas unu el la plej eminentaj nuntempaj aŭstraliaj romanistoj. Lia verko *La arkeo de Schindler* (ankaŭ konata kiel *La listo de Schindler* [1982]) estis sukcese filmita kaj diskonigita tutmonde.

EN ĈI TIU NUMERO

La marvirino (Gaye Phillips).....	3
“Esperanto por plezurigi vin (T.Manley).....	5
Geedziĝo de Katja kaj Trevor Steele.....	8
Recenzo: <i>Rusa novelaro</i>	9
Respondo al la eseo de la redaktoro (Marcel Leereveld).....	10
Informo bezonata (Bob Felby)....	12
Historio de Esperanto en Aŭstralia — Redcliffe Qld.....	12
Deziras korespondi.....	14
For the Beginner: Jargon (db).....	15
Eddie Desailly [foto].....	19
Interrete.....	19
La korlativoj (Marcel Leereveld)..	20
Protokolo de la ĝenerala kunveno de AEA en Brisbano januaro 2004.....	23
Granda ŝanco helpi al Indonezio (Jennifer Bishop).....	29
El la regionoj.....	30

Esperanto sub la Suda Kruco estas legebla per Interreto ĉe <http://www.sudakruco.org>.

Limdato por la juli-aŭgusta numero: 15 junio.

LA MARVIRINO

(Sensencaĵa Poemoj)

(Uzo por vortoj kiuj finiĝas per “in”)

de Gaye Phillips

Sur rok' en lago en la suda part' de Palestin'
Senĉese ploris dum la tuta tago marvirin'.
Belega, je matura aĝ' de jaroj dudek kvin,
De l' maro ekziliĝis ŝi, ĉar estis ŝi albin'.
Blankiĝis ŝia korp' de l' kapo ĝis la vostofin',
Krom unu ruĝa haŭtmakulo ĉirkaŭ la retin'.

Nu, unu tagon sur kamel' aperis filipin',
Kaj post li, nudpiede, marŝis lia konkubin'.
La blanka haŭto de la marvirin' ekcitis lin,
Kaj li proponis dungu ŝin en sia noktkazin' -
Situis ĝi en strat' sordida centre de Berlin'.
La marvirin' konsentis, ĉar doktor' de medicin'
En tiu urb' troviĝas, kaj laŭ loka magazin'
Kuracis kun sukceso la blankecon de albin'.
(Ŝi aŭdis tion de vaganta filo de sardin').

Do, unu jaron poste oni povis trovi ŝin,
La stelulino de la ruĝoluma noktkazin'.
Ŝi dancis sur la tabloj en filandra krinolin',
Kun franĝo ĉe la orlo, la koloro de karmin';
Kaj dormis ŝi post la labor' en granda lavotin',
Dum olda nano serenadis ŝin per mandolin'.
Nutraĵo ŝia estis nigra pan' kun margarin',
Kaj la ŝparaĵon kaŝis ŝi en sako el muslin'.

Alvenis nun la temp' por la doktor' de medicin'
Anstataŭ por honorario senblankigi ŝin.
(Li fakte estis ĉarlatan' kaj loĝis en Dublin'
Ĝis multaj senharuloj preskaŭ ŝnurstrangolis lin).
Unue do la korpon ŝmiris li per vazelin'
Kaj tiam aspergigis ĝin per floka naftalin'.
Kaj fine li enkirlis tason de gorilurin'.
Li lavis for la kaĉon per la suk' de mandarin',
Kaj ho, mizera tag'! Ankoraŭ restis ŝi albin'!

Kun kor' malĝoja turnis ŝi la dorson al Berlin',
Kaj fine alvenante al la lag' en Palestin'
Ŝi vidis ion kio ŝajnis al ŝi halucin' —
Samaĝan maroviron kiu estis — jes — albin'.
Li diris ke laŭ leĝa akto aĉa eglefin'
Lin provis senkapigi per malakra gilotin';
Kaj foje ĉasis lin kun alumeto kaj benzin',
Eĉ preskaŭ venenigis lin per dozo da striknin'.
Do li eskapis de la mort' en maroflugmaŝin',
Sed falis el fenestro kiam super Palestin'
Sur branĉojn de tre alta kaj dornoza nigra pin',
Kaj devis li ripari sian voston per dekstrin'.

Li surgenuje diris ke li vere amas ŝin,
Kaj kun ĝojeg' akceptis ŝi la rolon de edzin'.
Do feliĉecon trovis tiu paro en la fin',
Kaj nun ni lasu ilin en la mano de destin'.

[Verko premiita en Konkurso 2.] □

Nia konkurso 2 plu daŭras. Ankaŭ vi povas akiri libro-premion per kontribuo de verko via. Proza verko almenaŭ milvorta,* taŭga por aperigo en *Esperanto sub la Suda Kruco*, aŭ elstara poeziaĵo almenaŭ 50-linia.* Sendu al la redaktoro.

*ne inkluzivas aŭtor- kaj verko-nomojn.

ESPERANTO-RADIO AŬSTRALIA 3ZZZ

Ĉiun lundon posttagmeze nova programo proksimume unuhora.
La aktualemajna programo estas tutsemajne aŭskultebla per Interreto ĉe www.3ZZZ.com.au.

Esperantlingvaj kantoj, novaĵoj, intervjuoj — tutmondaj kaj aŭstralaziaj.
Ĉiam aktuala — ĉiam klare aŭskultebla — aŭskultebla per ĉiu komputilo konektita al Interreto, uzante la programon Real Player aŭ RealOne Player (senpage elŝutebla ĉe www.real.com).

Aŭskultu — mem kontribuu vian voĉon per viaj pensaĵoj surkasedaj — diskonigu... Via redaktoro rekomendas ĝin. □

ESPERANTO POR PLEZURIGI VIN

(La temo de la AEA-NZEA Kongreso en Melburno januaro 2004)

Drameto prezentita al la kongreso dum la teatraĵa konkurso

Verkita de Terry Manley

(kun iom da helpo de aliaj)

Rolantoj:

Beletino: Preskaŭ surda maljunulino. — Jonathan Moylan

Endo: Klasafektulino, ĉiama komencanto de Esperanto. — Paul Gorney

Diketo: Kavaliro Les Patterson: Maldeculo. — Daniel Kane

Ŭano: Mielulo el Europo. — Matthew Maguire

Ĝendarmo: Kvinslanda policano. — Terry Manley

Sufloro: Sidas inter ni por memoriĝi nin. — Roger Springer

Scenejo: Manĝejo en la Kongresejo. Beletino sidas ĉetable kaj manĝas. Endo eniras kaj sidiĝas.

ENDO: Ho Esperanto por plezurigi vin! Kia temo!

Dikulo alproksimiĝas kun botelo da vino enmane foje drinkante el la botelo.

DIKETO: Bovofeko!! Esperanto por ebriigi min! Ĉu vi volas drinki kun mi?

Beletino rigardas ŝokite, Endo ofendite.

ENDO: Ho ne, ne! Sidu mi petas.

(Ĉiuj mangas silente)

Eniras Ŭano ĉirkŭrigardante ĉien kaj venas al la tablo.

Mallaŭte demandas:

ŬANO: Ĉu ĉi tie mi trovos seksperanton por plezurigi min?

ENDO: SEKSPERANTON!!! Ho la la! Ne, ne! Ĉi tie estas deca ejo. Libroperanton jes, edzperanton eble, sed seksperanton neniam!

ŬANO: Sed mi serĉas plezuron. Kiel mi atingos tion sen seksperanto?

BELETINO: Pardonu, pardonu. Miaj oreloj ne bone funkcias. Ĉu iu menciis Esperanton por plejzorgigi vin? Mi estas LKKano kaj mi certas ke la kongreso estas por zorgigi min. Iu petis min prizorgi simplan takson sed mi klopodis dum monatoj kaj ricevis nur kritikojn.

ŬANO: Ĉu vi rolas kiel seksperanto?

BELETINO: Ja, jes. Kompreneble mi parolas Esperanton.

ENDO: Ha! La kongreso estas nek por plezurigi nek por plejzorgigi vin. La temo devas esti Esperanto por polverigi vin. Ekzamenoj, ekzamenoj. Mi submetiĝis aŭ submetis min aŭ submetatis aŭ ĉu estas submetita ata ota... Ho ve! al la Ekzamenato ito oto... Antaŭ ol mi venis ĉi tien mi estis iom fiera..., memfida pri mia scio de nia kara lingvo, sed nun kia konfuzo! Mi sentas ke iu polverigis mian menson kaj ĉion blovis el la oreloj...

BELETINO: Ĉu trovis orelojn? Ĉu artefaritajn helpilojn por la oreloj? Mi perdis la miajn ie. Mi lasis ilin sur la manĝotablo hieraŭ ĉar mi ne deziris aŭskulti iun tedulon apud mi kaj viŝ...Ekmalaperis.

ŬANO: Ho plore malgaje! Manko de revo, revo. Mi venis de Eŭropo por renkonti tiun seksperanton por plezurigi min kaj nun vi informas min ke estas eraro! En Gotenburgo mi subaŭskultis Aŭstralianon parolantan pri seksperanto por plezurigi vin kaj jen mi. Sed kie estas li aŭ ŝi? Mi facile kontentiĝas.

Policano eniras kun pafilo direktata al ĉiuj inkluzive la rigardantaron

ĜENDARMO: Ahdo, ahdo, ahdo! Ĝuste kiel mi suspektis. Neniu moviĝu. Mi arestas vin ĉiujn. Restu en la seĝoj. Estas policanoj ĉe ĉiu elirejo. Vi ne plu povas ŝajnigi ke ĉi tie estas deca grupo de pacemaj homoj. Ni ja scias ke vi estas fasadorganizo por kaŝi seksumadon. Do kie estas la seksperanto?

ŬANO: Ho ĝoje! Mi pravis. Jes! Jes, kie estas la seksperanto?

ĜENDARMO: Ne provu tiun trompon ĉe ni. Vi estas unu el la suspektatoj.

ENDO: Al la aŭskultantaro. Ĉu ne suspektitoj? aŭ otoj?

ŬANO: Mi estas gasto en via lando. Mi venis de Eŭropo por plezurigi min. Ĉu vi deziras difekti la turismon al via lando pro minaco al vizitanto?

ĜENDARMO: Ha penslibera Eŭropo! Senleĝa diboĉejo! Vi konstatos ke la leĝoj ĉi tie estas la plej justaj en la mondo kaj la policanoj la plej honestaj.

Diketo flanken iras kun Ŭano por konsili lin.

DIKETO: Ne kredu lin. Policanoj ĉi tie estas terure malhonestaj. Proponu al li iom da mono.

ŬANO: Sed mi faris nenion kontraŭleĝan.

DIKETO: Tio ne gravas. Sen mono li tamen arestos vin.

Ŭano iras al Ĝendarmo kaj elprenas iom da mono.

ŬANO: Mi pretas mendi biletojn por la Polica Balo se plaĉus al vi.

Ĝendarmo manlerte kaj kaŝe enpoŝigas la monon, samtempe dirante al la

aŭskultantaro:

ĜENDARMO: Subaĉeto!! Ĉu vi ne bone aŭdis min?

ENDO: (Al Beleto) Tiu policano estas iom alloga ĉu ne? Iom praa sed samtempe iel ĉarma.

BELETINO: Ĉu varma? Ĉu varma vi diris? Ne, ne estas multe pli varme en mia urbo.

(Ĉiuj rigardas konfuzite.)

Senespere Endo mangestas al Beleto kaj enpuŝante sin inter Ŭano kaj Ĝendarmo:

ENDO: Sinjoro Ĝendarmo, pardonu miajn kunulojn. Ili ne rekonas inteligentan, bonaspektan homon kiam ili renkontas tiun. Ni estas deca grupo. Venu kun mi kaj ni serĉos tiun seksperanton.

Endo tenas la manon de Ĝendarmo kaj ili eliras kune.

ŬANO: Mi jam perdis sufiĉe da tempo. Ankaŭ mi iros serĉi tiun seksperanton.

Eliras.

DIKETO: Mi ne scias kial ili devas serĉi homon por plezurigi sin. Mi mem preferas ŝafon!

BELETINO: Ho ve nenia plezurejo estas ĉi tie. Nur la zorgoj de kongresorganizo. Mi estas la peranto por la ekskursoj sed nun mi deziras esti eksperanto por plezurigi min.

(Ambaŭ manĝas dum iom da tempo)

Poste Ŭano eniras kun bebo en la brakoj.

ŬANO: Mi trovis tiun, kiun mi serĉis sed ŝi jam havis ses infanojn. Ŝia titolo devas esti "Seksperanto por plejzorgigi min!"

Post nelonge Ĝendarmo kun vestoj skuitaj, stumblante reiras.

ĜENDARMO: Mi ja trovis la seksperanton por polverigi min!!!!

Falas sur la plankon.

FINO

[El *Telopeo* marto 2004] □



Por Ridigi Vin



Ĉe itala geedziĝa ceremonio la pastro demandis al la novedzino: Ĉu vi akceptas Frankon Giuseppen Antonion kiel vian edzon?"

Ŝajne konfuzita, ŝi respondis: "Mia pastra moŝto, okazis eraro. Mi edziniĝas nur kun Franko."

[El *Antaŭen* (Hispanio) jan. 2004; sed ĝin sendis al *Antaŭen*...Patricia Harkin de Aŭstralio] □



Katja kaj Trevor Steele

Trevor skribis: Mia Katja estas slovakino, kaj ni geedziĝis en Poprad, kie ni unue renkontiĝis en 1991. Poprad situas piede de la tre imponaj montopintoj de la Alta Tatra-Montaro, eble la plej spektaklaj en Eŭropo. La 6-an de marto estis tre malvarma tago, sed la ĉielo bluis kaj la blanka brilo de la ĉiea neĝo memorigis pri tro belaj pejzaĝaj poŝtkartoj.

Post kelkaj semajnoj mi demisios. Katja kaj mi iros al Hindio (Bangaloro) instrui tie dum kelkaj monatoj. Kion instrui? Nu, kompreneble Esperanton, nian solan komunan lingvon. Poste ni veturos al Aŭstralio, kie ni lanĉos novan karieron kiel instruistoj de Silva Method.

Krome, mi intuicias, ke nun mi refoje verkos, kaj ĉiukaze ni du emas ion kontribui al Esperanto en nia nova-malnova hejmlando.



Por Ridigi Vin



“Paĉjo, hodiaŭ mi ŝparis ses monerojn, ĉar mi ne eniris la aŭtobuson sed kuris post ĝi.”

“Bone, sed ne tre,” respondis la patro. “Vi devus kuri post taksio, tiel vi povus ŝpari pli da mono”.

[El *Antaŭen* (Hispanio) jan. 2004]



Recenzas via redaktoro



Rusa novelaro: Volumo 1: la 19a jarcento. Redaktis Aleksander Korĵenkov. Kaliningrad: Sezonoj, 2003. 400p., bindita.

Takso: 🍓🍓🍓🍓🍓

Ĉi tiu estas la unua el tri planataj volumoj por Rusa antologio. La du sekvaj estos *Rusa novelaro volumo 2: la 20a jarcento*, kaj *Rusa poemaro*. La 28 noveloj en ĉi tiu unua volumo inkluzivas novelojn de Aleksander Puŝkin, Miĥail Lermontov, Nikolaj Gogol, Ivan Turgenev, Fjodor Dostojevskij, Miĥail Saltykov-Ŝĉedrin, Lev Tolstoj, Anton Ĉeĥov; kiuj varias inter tre mallongaj (3p.) kaj longaj. La redaktado estis tre zorge prizorgita, la tradukoj (faritaj de diversaj personoj) estas klaraj kaj apenaŭ riproĉeblaj. Multaj notoj fine de la volumo klarigas aludojn en la rakontoj, informas pri la historio de la aŭtoroj, kc.

Satiro kaj misteremo karakterizas multajn el la noveloj. Pluraj el la aŭtoroj amas lasi la finon de siaj rakontoj iomete nebula. Pluraj rakontoj estas komikaj. Ke rakonto, aŭ aŭtoro, estas “klasika” neniel signifas ke ĝi estas seka, teda, eĉ instrua.

Certe la stilopreferoj multe varias. Kelkaj aŭtoroj, inter ili eble plej kulpas Tolstoj, emas trovortumadi. La tolstoja “Neĝoŝtormo” precipe oscedigis min – mi aŭdacas hereze komenti, ke simile al Tolkien, Tolstoj emas trodetale priskribi, tiel ke la homa sento kelkfoje pereas inter tro da materialaj detaloj. Iam mi komentis pri Tolkien ke, metafore, li kvazaŭ priskribas ĉiun faceton de ĉiu ŝtonero renkontita; similmetafore, Tolstoj kvazaŭ priskribas ĉiun faceton de ĉiu vojturniĝo. Finleginte la rakonton, ni kredas koni la pejzaĝon tre bone, sed la personojn nur neklare. Iel mankas animo en la priskribiĝo.

Tre malsimile, finleginte la rakonton “Asja” de Turgenev, ni kredas tre intime koni ambaŭ ĉefrolulojn (Asja, la mistera knabino; kaj N.N., la ne tre plaĉanima rakontanto). Mi forte reagis emocie (kaj negative) pri tiu N.N., leginte la lastajn alineojn. Tia forta emocio ne trafis min post la alineoj de Tolstoj.

Tre interesis legi la praklasikan literaturaĵon esperantlingvan, tradukitan de Antoni Grabowski kaj libroforme eldonitan en 1893, “La neĝa blovado” de Puŝkin, reaperigitan en ĉi tiu volumo kun nur kelkaj korektoj. Ankoraŭ ĝi donas al ni iom da spironretena anticipado dum ni legas la misteran eventon kaj ĝian sekvon.

Esperable la dua volumo da rusaj noveloj ne longe prokrastiĝos. Ĉi tiu unua volumo estas elstara kontribuo al nia literaturo. □

RESPONDO AL LA ESEO DE LA REDAKTISTO¹

de Marcel Leereveld

Don Broadribb klare kaj konvinke montris, ke la lingvo malmulte influas la pensadmanieron nek la kulturon, kvankam la kulturo kompreneble influadas la lingvon. Nur ĉar ni “Kokakola'on” trinkas, nia kulturo (iom-ete) ŝanĝiĝas, ne ĉar la vorton ni uzas.

Krome plifortigas la Don'an opinion, cetere tre komunan, ke kulturo ne estas rigida fenomeno, sama por ĉiuj enloĝantoj de unu lingvoregiono. Ekzemple en malgranda Nederlando (surfaco egala al duono de Tasmanio!) kun la sama nombro da enloĝantoj kiun enhavas tuta Aŭstralio, ekzistas centoj, se ne miloj, da malsamaj, kelkfoje tre malsamaj, kulturoj, sub unu lingvo, la nederlanda (tre forta el la faktoroj kiuj unuigas tiujn [malsamkulturajn] nederlandanojn).

La sitenon de UEA kontraŭ la angla lingvo mi klarigas ne kiel Don, sed tiel ke aliajn kulturojn usonecigas ne la lingvo sed la ekonomia kaj politika influoj de Usono, kaj ke tamen la lingvo helpas tiun ekonomian influon. Iomete simile al la kolonia epoko, kiam la kristanaj misiistoj, plejparte neintence, kreis bazon por poste ekspluati la koloniojn pli efike. Sed mi akordas, ke tiu UEA-starpunkto estas nenecesa kaj eble malutila, ĉar kvankam la plejmulto el la Esperantistoj estas malamikoj de Usono, pro ĝia militemo kaj ĝia manipulado ante landojn ĉie en la mondo, ni ne forgesu unue, ke duono de la tuta usonanaro estas same malamika al la politiko de sia lando, kaj due ke la angla lingvo ne kulpas pri tio kaj ke kontraŭe landoj kiaj Japanujo kaj Ĉinujo multe uzadas la anglan lingvon ĝuste por kontraŭi la usonan potencon.

Kaj ĉar ĉia interkomunikado inter popoloj estas, laŭ Don, egale gravega, ĉu per la angla aŭ per Esperanto, ni devas helpi kaj Esperanton kaj la anglan lingvon (kaj eble la hispanan kaj la ĉinan) fariĝi internaciaj lingvoj. Supraĵe oni eble konkludos, ke Don konsideras Esperanton, por internaciaj rilatoj, ne pli utila aŭ grava aŭ dezirinda ol ekz. la anglan. Sed tio estas miskonkludo.

Ĝi estas miskonkludo, ĉar sendube pro la jama longeco de lia eseo li ne menciis tri tre gravajn aspektojn kromajn, pri kiuj lii certe estas konscia kaj samopinia.

La unua estas, ke Esperanto kiel internacia lingvo estas multe pli taŭga kaj kontentiga kaj utila ol etna lingvo, speciale ol la angla. La tialoj estas, ke ĝi estas pli fidebla, kaj multe pli mallongtempe lernebla (Don eble refutos, ke 90% da Esperantistoj same malbone lernintas la lingvon kiel 90% da anglolernintoj, sed tion kaŭzas la iom neserioza nek funda instruado ante Esperanton: por multaj perfektaj kaj neperfektaj esperantistoj Esperanto estas nur ludaĵo).

1. *ENK* 67 (Januaro-Februaro 2004), p.5-7

La rezulto de tiu relativa facileco estas, ke Esperanto povas sukcese lernati de kvinoble pli da homoj ol etna lingvo. Estas precipe pro ĉi tiu tialo, ke Esperanto estu “la Latino por la popolo”, por la amasoj. La angla lingvo povas plene uzati nur de tre malgranda nombro da alilingvanoj; ĉi tiuj formas malgrandan kaj specialistan eliton. La resto nur balbutas. Ekzemple la nederlandanoj jam bonege balbutas, kiel mi, la anglan, kvankam ne sufiĉe por diskuti temojn kulturajn, sciencajn, kaj specialistajn per ĉiuj pensoj troviĝantaj en la menso. Flankrezulto estas, ke la anglospecialistoj ne deziras perdi sian eliton staton. Ili timas Esperanton, kiun relative multe pli da homoj povus regi same perfekte kiom la elito de la neelnaskiĝaj angloparolantoj.

La dua, forgesita, aspekto estas, ke 90% da neangloj lernintaj, eĉ relative funde, la anglan lingvon restas “eksterlandanoj”, “fremduloj”, neegalaj, kvazaŭ koloniigitoj. Tiuj 90% ne nur estas kaj restas malsuperuloj, sed ili ankaŭ sentas sin tiaj. Kaj la elnaskiĝaj angloparolantoj simile kaj aŭtomate sentas sin superuloj, eĉ se ili ne volas. Tio ne estas sana stato en internaciaj komunikado kaj interrilatado. La interesa fenomeno estas, ke inter Esperantistoj oni trovas sin egala unu al la alia, eĉ se estas granda malsameco inter lerninteco. Oni ne sentas sin superulo aŭ malsuperulo, koloniiganto aŭ koloniigato.

La tria aspekto estas, ke verŝajne pro tia egalemo, la Esperantistoj ĝenerale favoras kaj prizorgemas la retenon de la granda nombro da mortriskaj lingvoj kaj dialektoj. Same kiel verŝajne Don (laŭ la tono de lia eseo), la parolantoj de grandaj lingvoj ne interesiĝas pri la diverseco de lingvoj, eĉ postulas la ŝanĝon al siaj lingvoj: rigardu la britojn kaj la francojn en siaj kolonioj! Sed ĝuste la Esperantistoj, pro tialo nebula, amas tiun diversecon kaj pretas zorgi pri ĝi. Ankaŭ pro tiu hazardo Esperanto estas supera al la etnaj lingvoj, kiel internacia lingvo. □



Por Ridigi Vin



La Reĝo Louis 14 decidis foje verki poemon.

Kiam li finis skribi, li komencis serĉi literaturiston kaj trovis San-Simonon, kiu estis tre fama specialisto pri literaturo.

“Markizo”, diris Louis 14, “mi verkis poemon. Bonvolu tion tralegi kaj diri vian opinion.”

San-Simono komencis legi kaj dum la tuta tempo li sentis la sentiman persistan rigardon de la reĝo. La humoro de la leganto fariĝis tre malbona. La reĝo estas verdire ĉiopova, sed la poemo suferas pro tre malbona kvalito.

“Mia Reĝo, ne ekzistas eĉ unu afero, kiun Via Moŝto ne povas fari.” diris San-Simono. “Mi vidis ke la Reĝo deziris verki tre malbonan poemon, kaj Li sukcesis eksterordinare...”

[El *Israela Esperantisto*] □

INFORMO BEZONATA

Karaj geamikoj, aŭstraliaj esperantistoj!

Jen mesaĝo de mi pri io, kio koncernas nin ĉiujn, io tre grava!

ILEI-Aŭstralio eĉ tre forte sentas la bezonon de pozitivaj informoj ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri instruado de Esperanto en Aŭstralio, precipe pri tia instruado en universitatoj kaj aliaj lernejoj ktp., eĉ pri instruado tute privata.

Plaĉus al ILEI scii kiom eble plej multajn detalojn rilate tiun temon. Do se vi mem, instruis nian lingvon, aŭ se vi konas iun, kiu faras, faris, tion, iam aŭ se vi ankoraŭ tion faras, bonvolu informi nin – vi povas tion fari skribante al mi – esperantobob@iprimus.com.au. Nin interesas ankaŭ kiam vi instruis, kiom longe, al kiom da gelernantoj, kaj ankaŭ la rezulton de via instruado.

Estas nuntempe terura manko de tiaj informoj. Propagandante, eble ni devus skribi “informante”, ni ofte estas pridemandataj pri tio, ĉu Esperanto ankoraŭ ekzistas, ĉu ne? Ni ĉiuj aŭdis tion de tempo al tempo! Estus bone, se ni povus tuj klare kaj pozitive respondi, ke Esperanto ja vivadas, kaj estas nuntempe kaj hodiaŭ regule instruata en tiuj kaj tiuj publikaj lernejoj ktp. Tio do estas nia plej urĝa tasko, kompili tian liston de lernejoj, aŭ aliaj ejoj, kie Esperanto estas instruata.

Mia unua peto al vi estas do, ĉu vi povus informi min pri tiaj aferoj por ke ni ĉiuj povu komune strebi al la disvastigo de nia kara lingvo, Esperanto?

Via Bob Felby (esperantobob@iprimus.com.au)

□

HISTORIO DE ESPERANTO EN AŬSTRALIO

Redcliffe, Kvinslando. Loko de la AEA/NZEA Kongreso en 2004

El *The Australian Esperantist* sub rubriko “Aŭstralia Kroniko”

Jan-Feb 1968

Redcliffe: Zamenhof-festo de la Redcliffe grupo okazis en la hejmo de Lady Frazer. Proks. 30 personoj ĉeestis (la sama nombro ĉeestis la feston en Brisbano-Red). Honoraj gastoj estis la Parlamentano por Redcliffe kun edzino, la urbestro de Redcliffe kun edzino kaj la Prezidanto de la Brisbana E-societo kun edzino.

S-ro Guenster, Prezidanto de la Brisbana Esperanto-societo, donis instigan paroladon en la angla lingvo kaj en Esperanto... La edzino de la urbestro tranĉis la kristnaskan kukon, ornamitan per la Esperanto-insigno, kaj deziris bonan sukceson al la grupo en la jaro 1968.

Marto 1968

Redcliffe: La 5-a jarkunveno okazis en la hejmo de Lady V. Frazer. La Prezidanto (s-ino J Clark) donis la jarraporton kaj konstatis kun plezuro, ke la societo akiris pli grandan anaron en 1927. [devus esti 1967-Red] ... Elektiĝis la jena estraro: Prez: Lady V.Frazer...

Aŭgusto 1968

LADY VIOLET FRAZER

En la 27a de julio pace mortis, post malsano, Lady Violet Frazer, fidela laboranto por Esperanto ĉe Redcliffe, Kvinlando. Al ŝia edzo, Sir Douglas Frazer kaj iliaj familianoj, la Aŭstralia Esperanto-Asocio esprimas sinceran kondolencon.

Nov'. 1968

Redcliffe: ...Nia membraro konsistas el 13 plenkreskuloj, 9 gejunuloj kaj 11 infanoj.

Dec'. 1968

Redcliffe: The Children's Esperanto Group of Redcliffe held a most successful party, 23/11, at the home of Mr. and Mrs. V. C. Clark, 77 Sorrento St, when they ably spoke, sang and played in Esperanto. About 70 guests were present. The children in national costumes, each represented a non-English-speaking country, but, as each could speak Esperanto, there was no difficulty in communication.

Nov'. 1970

Redcliffe: La vizito de S-ro Goldsmith al la grupo estis la signifa okazo. Ĉirkaŭ 20 anoj kaj amikoj ĉeestis...

El *Esperanto en Aŭstralio 1905-1985* de Ray Ross:

Redcliffe Esperanto-Grupo 1962-1979

La grupo fondiĝis en 1962: S-ino V. Frazer estis estrarano de BES 1954-59 kaj post translokiĝo al Redcliffe, instruis al samideanoj en Redcliffe, Esperanton ... En 1964, post traktado kun la loka magistrato, Esperanto-strato estis nomita dum taŭga ceremonio tiucele; ĉi tiu estis la unua Esperanto-strato en Aŭstralio. □



Por Ridigi Vin



Gabrovano aĉetis kilogramon da sukero, sed trovis en ĝi sablerojn. Li sendis al la redakcio de la loka ĵurnalo jenan anoncon: "Hieraŭ mi aĉetis sukeron en kiu mi trovis sablerojn. Se la butikisto kiu trompis min ne alportos al mia hejmo du kilogramojn da pura sukero, mi anoncos lian nomon en la ĵurnalo."

La sekvan tagon kvin butikistoj el diversaj partoj de la urbo alportis al li po du kilogramojn da sukero. [El *Antaŭen* (Hispanio) jan. 2004] □



Dezirás Korespondí



- Iwona Broniewska, ul. Jagiellon'ska 58 m.112, 03-468 Warszawa, Polando:

“Bonvenon! Mi havas 42 jarojn, estas edzino kaj mi laboras kiel bibliotekistino en biblioteko por infanoj kaj junularoj. Mi interesiĝas pri literaturo kaj pri geografio.

Mi komencis lerni Esperanton kaj mi volus korespondi kun geamikoj el Aŭstralio en tiu lingvo.

Ĉu iu povus kun mi skribi?

Mi deziras sanon kaj sukceson en Nova Jaro.

Kun salutoj,

(I. Broniewska)

- Mi estas 31 jaraĝa esperantisto loĝanta en Hararo kie mi vivas kiel rifuĝinto. Se mi interesiĝas pri Aŭstralio estas ĉar, krom neantaŭviditaĵoj, mi tie enmigros. Estas aŭstralia kristana organizo kiu sendis al mi formularojn kaj subtenis mian kandidatecon. Mi jam sendis la formularojn al la ambasado de Aŭstralio en Sudafriko kaj nun atendas ilia respondon.

Pro tio ke Aŭstralio tre baldaŭ fariĝos mia lando, mi opinias ke esti en kontakto kun samideanoj el Aŭstralio, iel helpos al mi kiam mi tie alvenos. ntumbakapinga@hotmail.com



Por Ridigi Vin



Kuriozaj demandoj

Ĉu infanoj ĝuas infanecon samkiel adoltoj ĝuas adulton?

Kion kalkulas ŝafoj por dormi?

Kial la nigraj prunoj estas ruĝaj kiam ili estas verdaj?

Se frostigilo troviĝas je ne pli ol -10° kaj Antarktiko kutime troviĝas je -50° , ĉu homoj ne povus varmiĝi enirante la frostigilon?

Kiucele ni kuras kiam pluvos, se antaŭ ni ankaŭ pluvos?

El kies arbo venas la frukto de laboro?

Kial ni levetas la ŝultron kiam pluvos? Ĉi ni malsekiĝas malpli?

Kiu estas la fama persono Oni Konstruas, kiu ĉiam baras la stratojn?

Kion oni faru, se oni vidas endanĝerigitan specon de besto manĝanta endanĝerigitan specon de planto?

Kiukolora estas kameleono rigardanta sin per spegulo?

Kial Bill Gates nomis sian mastruman sistemon por komputiloj “Windows”, se li povus ĝin nomi “Gates”?

Ĝis kie kalvuloj lavas sian vizaĝon?

[El *Antaŭen* (Hispanio) jan. 2004]

For the Beginner

by Donald Broadribb

Jargon

Once upon a time it was usual for English teachers to drill their students in what was quaintly called “English Grammar”. “Quaintly,” because to a very large extent what was taught had no real connection to the English language at all, but was in fact based on the tradition of analysing the ancient Latin language.

This tradition was largely abandoned in our school system quite a few years ago, and probably the majority of adults living now have not had to suffer through the one-time drills. Unfortunately, our Esperanto textbooks were mostly written in those long ago times of 40 or 50 years ago, and assume not only that their readers were schooled in those now abandoned methods, but that they readily understand much of the traditional grammatical jargon that went with them. As a result, many present day students of Esperanto are very bewildered at what these terms refer to. So today I am presenting a list, with explanations, of the grammatical jargon terms that all too often stump present day students.

One problem with using traditional grammatical jargon is that it actually is not easy to apply to Esperanto. This is the reason why Esperanto grammar often seems very complicated to beginners, who are faced by textbooks that use jargon that is ill suited to both English and Esperanto.

A second reason beginners often find Esperanto grammar difficult, is that English uses very different methods to express its ideas. In particular, the order of words in English is often used **instead of** special word forms which Esperanto, along with many other languages, relies on to express meaning.

The purpose of the following list is to explain what the textbooks mean by their special jargon, and how their technical terms apply — even though sometimes very poorly — to Esperanto.

In the list that follows, *italics* are used to indicate that a term is discussed elsewhere in the list.

Accusative Case: In a sentence such as “John hurts his foot” there are three main parts:

John: the “*subject*” of the sentence. “Subject” here does not mean “topic”. It means a person or thing stated to be doing something.

hurts: the “*verb*” = what is being done.

his foot: the “*object*” of the verb = what the the *subject* (John) is doing this hurting to.

In many languages, including Esperanto, this last bit, the *object of the verb*, is marked in a special way. Esperanto marks it by adding **-n**: “sian piedon”, and in grammatical jargon this is called “putting those two words into the accusative case”.

In Esperanto, **-n** is not only used to indicate for this purpose, but also for other completely different purposes. For this reason, talking about the “accusative case” is not very appropriate either for Esperanto or for English.

In English we usually do not use a special marker in such a sentence, but use a special word order instead of **-n**.

English once did have a genuine accusative case, however, and English still has five words with special “accusative case” forms: **me, him, her, them, whom**. As in Esperanto, these five words are also used for various other special purposes as well.

Active: This term usually refers to certain kinds of *verbs* and *participles*. It refers to “doing something”, rather than “having something done to it”.

Adjective: This is a type of word that describes something. For example, “**big**” in the sentence “His foot is **big**”. In Esperanto, **-a** is usually used to mark such a word: “Lia piedo estas **granda**”. There are also a few other words that do not end with **-a** but which also describe things: **iu, tiu, kiu, ĉiu, neni**, and a few others.

In English we usually have no special marker for this sort of word.

In Esperanto, adjectives must *agree* with their *nouns*: this means that adjectives must have an added **-j** or **-n** or **-jn** if they are used to describe something which is written with **-j** or **-n** or **-jn** in the same sentence. For example: “**big** feet” is “grandaj libroj”. The five words **iu, tiu, kiu, ĉiu, neni** also must add **-j** or **-n** or **-jn** in the same way.

Adverb: A type of word used to describe how or when an action is done, or to describe an adjective. For example: “She sings beautifully”. In Esperanto such words frequently are marked with **-e**: “Ŝi kantas bele”.

The category of “adverb” can also apply to instances that may not be immediately obvious to an English speaker: “Often she comes at noon” = “Ofte ŝi venas tagmeze” (two adverbs in the Esperanto form of that sentence!)

In the sentence “Sometimes I am lonely”, the first word is considered an adverb: “Kelkfoje mi estas solsentata”. Esperanto considers the

final word to be an adjective instead of an adverb when “estas” and some other *verbs* are involved. Further detail on how Esperanto grammar decides whether an *adjective* or adverb is involved can get very complicated and is best left to advanced courses on the language.

In English we sometimes mark adverbs by using the ending **-ly**, but usually we do not use a special marker.

There are also in Esperanto many words traditionally considered to be “adverbs”, but which do not use the marker **-e**.

Agree, Agreement: Making a word take the same endings as another word it goes with. This is rare in English, but frequent in Esperanto. “Big books” = “Grandaj libroj”; “John hurt his feet” = “Johano vundis siajn piedojn”. “His” becomes “siajn” because “feet” ends with **-jn**. In grammatical jargon, an *adjective* agrees with its *noun*.

Case: In many languages *nouns* and *adjectives* have special forms to indicate ideas that are indicated by special extra words or by special word order in English.

Present day English uses only two cases: the normal form, and the *possessive* form: for example: **John** and **John’s**.

Many textbooks speak of Esperanto as having two cases: the *nominative* and the *accusative* cases. There are also a few traces of a *possessive* case. Whether using these terms is helpful or useless depends on your personal opinion. Generally speaking, the concept of “case” as in Latin or Russian does not really apply either to English or to Esperanto.

Clause: A group of words which actually fills all the requirements for being a *sentence*, but which is used as part of a bigger sentence.

Collective plural: In English, this is a *noun* which refers to a group but does not use a special form to indicate this. For example, “the **sheep** are fat”. (The word **sheep** can refer either to a group of sheep, or just one one sheep, you have to decide for yourself which is meant.) A very few other words in English are also used in this way.

In Esperanto there is one word that can be used to refer to only one person or as a collective plural: **oni**, which may either refer to one person or a lot of people.

Conjunction: A conjunction is a small word which is used to join other words together, for example: **and**, **but**, **or**.

In English and in Esperanto, there is not much point in distinguishing a category of “conjunction” from a lot of other little words which do not really fit into any particular category.

Direct object: Generally speaking, a direct object is the *object* of a *transitive verb*.

As an example: the sentence “I give my father a book” = “Mi donas al mia patro libron” —

In examining that sentence we find:

Subject: I (mi) = the person who does something.

Verb: give (donas) = what I do

Direct object: a book (libron) = what I give

“Indirect object”: my father (al mia patro) = who I give it to

To work out which is the direct object, we ask: what do I give? The answer is: a book. “A book” is the “direct object” of the *verb* “give”.

English has no method of indicating this other than the order of the words. Generally speaking, the order of the words in this particular sentence cannot be changed in English.

In Esperanto **-n** is used to indicate a direct object. The order of the words does not much matter as far as grammar is concerned. We can say “mi donas libron al mia patro”, “mi donas al mia patro libron”, “mi libron donas al mia patro”, “libron mi donas al mia patro”, “al mia patro mi donas libron”, “al mia patro mi libron donas”, “al mia patro libron mi donas” “mi al mia patro libron donas”, etc. (But **not** “mi donas al libron mia patro”, which is a forbidden word order in Esperanto.)

Genitive: In some languages this is a special given to *nouns* in certain situations. In English grammar, the term “genitive case” is often used to mean “possessive case”, which usually is made by adding **’s** to a *noun*: John’s book, the children’s hands, etc. There is no genitive case in Esperanto, although there are a few traces of a *possessive* case. (See in this list the treatment of “*possessive*”.)

Gerund: This refers to a type of word in Latin. There is no equivalent in Esperanto, although some grammarians mistakenly use the term to refer to Esperanto adverbial or noun *participles*. In Esperanto these are simply *adverbs* or *nouns*.

Indirect object: This is not really an “*object*” at all, nor is it indirect, in English or Esperanto. In some languages (Latin, Greek, and others) a special form is given to the words “my father” in such a sentence as “I give my father a book”.

(To be continued.)



Eddie Desailly (marto 2004)
(filo de Paul kaj Velanta Desailly, nuntempe en Ĉinio)

INTERRETE

- **Esperantistoj aŭstraliaj** nun havas propran novan retgrupon por diskuti inter si. Ĝia adreso estas <http://groups.yahoo.com/group/esperantoaustralia/>. Por membriĝi, iru al tiu adreso kaj musumu sur “join group”. Ĉar temas pri unu el la Yahoo-grupoj, necesas enskribi kelkajn detalojn pri vi kaj via adreso – klakinte sur “join group” vi vidos informon pri kio estas bezonata.
- **Ĉu vi havas recenzojn?** Se vi havas recenzojn pri esperantaj verkoj, vi povas disponigi ilin al Esperanto-legemuloj pere de la parto “Recenzoj” en la nova reta Katalogo de UEA. La parto estas konstruita tiel, ke iu ajn povas aldoni novan recenzon – kaj post teknika kontrolo fare de la administrantoj ĝi iĝos alirebla en la propra informpaĝo de la respektiva libro.

La recenzoj en la Katalogo estas ankaŭ aparte serĉeblaj kaj tra-rigardeblaj liste laŭ diversaj kriterioj. Iru al: <http://katalogo.uea.org/>

Informis Andrej Grigorjevskij. Rete: andreo@esperanto.msx.ru.

[fonto: *ret-info*]

LA KORELATIVOJ

de Marcel Leereveld

Ĉiuj Korelativoj estas Pronomoj, t.e. ili estas mallongaj anstataŭantoj kaj reprezentantoj de substantivoj kaj aliaj vortoj, kaj ankaŭ de frazoj. Jen kelkaj ekzemploj: *Io* (= afero) ne ĝustas en lia rezonado; Grimpantajn rozojn? Mi ne ŝatas *tiajn* (= grim pantajn) rozojn. *Tiuj* (= indikitaj homoj) vizitis la klubon *neniam* (= je nula fojo); *Ies* (= de homo) propono nun diskutatas; *Iu* (= homo) falis de sur la tegmento; *Ĉiuj* (= la tuta grupo de viroj sen escepto) viroj ĉesis grimpi la monton; *Kial* (= pro kiuj kaŭzo kaj rezono) li ne venis?; Ni solvos tion *iel* (= en ankoraŭ nekonata maniero); *Iom* (= nekonata kvanto) da sukero falis en la supon; *Ŝi* ne loĝas *tie* (= en indikita loko).

Ekzistas naŭ specoj, ĉiu el ili kun kvar kvazaŭ-derivaĵoj per specialaj prefiksecaj literoj (ies, tio, kiu, ĉiam, neniel).

La Korelativoj finiĝantaj per vokalo povas ricevi, se necese, la akuzativan -n kaj, se ili ne estas adverboj, ankaŭ la pluralan -j (*tion, nenien, kiaj, ĉiujn*).

Ĉiu el la naŭ Korelativgrupoj apartenas al iu speco de vorto; unu tamen al du specoj. Oni do povas klasigi substantivecajn (*io, iu*), adjektivecajn (*ia, iu, ies*), adverbecajn (*ie, iam, iom, iel, ial*).

Same kiel ĉe aliaj pronomoj, oni povas derivi el ili kaj alikategoriigi ilin, kvankam tio ne ofte okazas (la kioma horo; ĉiesulino; tioaĵoj; la tialo (ofte erare uzatas la formo “*kialo”); li daŭre tieas).

La pronomo-korelativo “*iu*” (“*tiu*”, ktp) estas esence adjektiveca. (*Iu* birdo malaperis; *tiu* domo morgaŭ malkonstruatos; ...la domon, *kiu* (domo) malkonstruatos; *ĉiuj* homoj; *neniu* vento). Sed ĝi povas uzati substantivece, en kiu kazo ĝia signifo reduktatas al nur homoj (kaj aferoj personigitaj): (Mi malŝatas *tiujn, kiuj* volas fari militon; *Iuj* forgesis sian ombrelon; *Ĉiuj iam* devas morti; *Neniu* antaŭvidis tion).

Ĉar ili estas Pronomoj, la Korelativoj povas klasigati laŭ la diversaj specoj de Pronomoj. Oni nomas la neprefiksitajn Nedifinaj Pronomoj (*iu, iel, ia, ktp.*). Tiujn kun t- oni nomas Montraĵ Pronomoj (*tio, tia, tiom, ktp.*). Tiuj komenciĝantaj per ĉ- nomiĝas Sumigaj Pronomoj (*ĉiu, ĉie, ĉiam, ktp.*). Kaj tiuj per nen- nomiĝas Neaj Pronomoj (*nenia, nenies, nenial, ktp.*). La Korelativoj kun prefikseca k- apartenas aŭ al la Demandaj Pronomoj (*Kio?, Kia?, Kial?*) aŭ al la Rilataj Pronomoj (*Por tiu, kiu jam finis; Dum la tempo, kiam mi...; Ili vizitis urbon, kien mi neniam iris*).

La adverbo “*ĉi*”, signifanta plian proksimecon al la parolanto, ofte aldonatas al kelkaj el la Korelativoj, precipe al “*tio*”, “*tiu*”, kaj “*tie*” (*ĉi tiu verkaĵo, ktp.*). Teorie ĝi povas aldonati al la aliaj Korelativoj, kaj oni eĉ trovas ĝin, kvankam malofte, kun la Sumigaj Pronomoj (*ĉi ĉio naŭzas min; ktp.*).

Pro siaj diversaj vortspecoj, la Korelativoj povas havi, aŭ kompletigi, ĉiujn funkciojn en la propozicio:

Subjekto: *Iu* retrovenis; *Kio* okazis?; *Neniom* restis. *Ĉio* detruatis de la invadantoj; *Ĉi tiom* tro multas por mia kofro.

Predikato: La kvanto *ĉiam tiomas*; *Tio* estas lia profesio; Lia profesio estas *tia*, *kian* oni bezonas en tiu lando; Ni konsideras lin *tiu*, *kiu* plej meritas la premion; La kulpo devas montriĝi *ies*; Mi konsideras la kulpon *nenies*.

Objekto: Ni vidis *neniun* en la domo; Ni elektis *tiun*, *kiun* ni konsideris plej taŭga; Ne manĝu *ĉion*!; Mi aĉetis *tiom*, *kiom* mi bezonas; Ni akceptis lian *tialon*; Mi kulpigas *tiun* en la angulo.

Adjekto Adverba: *Kial* li retrosendis ĝin?; Ili loĝas *ĉi tie*; Li intencas *iam* vojaĝi; *Ŝi neniel* sukcesos; *Ŝi laciĝis iomete*. Ankaŭ: *Ŝi malsanis tiutempe*; Li elektatis *ĉiesaplaŭde*

Adjekto Prepozitiva: Li foriris por *ĉiam*; *Ŝi laciĝas pro nenio*; Mi sendos ĝin *tien* (= al *tie*); Pro lia evidenta malsatego, mi donis *tiun ĉiom*, *kiom* mi havis; Restu ĝis *tiam*; Ili frue vojaĝis el *tie*.

Epiteto: Mi ŝatas *tiajn* florojn; *Ĉiaj* koloroj aperis; *Ties* brako vundiĝis; Retrokonduku *tiun* infanon; *Ĉu* li havas *iun* ideon pri tio?; En la *tiama* tempo oni kutimis al tio; Je *kioma* horo ci foriros?; Je *tioma* horo; *Kiun* tagon si retrovenos?

Suplemento: La miskonduto de *tiu*; Lia foriro por *ĉiam* plorigis nin; Ni ne sciis la kaŭzon de *tio*; Sia ektimo pro *nenio*; Lia zorgemo pri *tiom* nervemigas lin; Lia batalo kontraŭ *ĉiuj*.

Ĉar la Rilataj Pronomoj *kio*, *kiu*, *kia*, *kies*, *kie*, *kiom*, *kiel*, *kial*, kaj *ki-am* enkondukas subordan propozicion, oni nomas ilin ankaŭ Subjunkcioj.

Se temas pri grado, prefere uzu *tiom/kiom* (kvankam tro da ili tro pezigas la stilon): *Ŝi* estas *tiel* (same) malsana *kiel* mi estas = en la sama maniero, en la sama malsaneco; *Ŝi* estas *tiom* malsana *kiom* mi estas = en la sama grado de graveco, sed ne necese en la sama speco de malsano; *Tiuj* floroj estas *tiom* belaj *kiom* la miaj, *tiom* grandaj *kiom*...; ktp.). Krome evitu neoficialajn prefiksoidojn: *ali* (**alies*, ktp) kaj radikon *neni* kiel en **neniigi* (= *aliies*, *nenioigi*).

Notoj por gramatikemuloj

1). La pronoma adverbo “kiel” signifas “en kiu maniero”. Se uzata kiel subjunkcio rilata adverba pronomo, ĝi retenas sian tiun signifon, sed jam Zamenhof, imitante etnajn lingvojn, erare uzas ĝin ankaŭ en tute alia signifo, prepozicia, nome “en la funkcio de”, “funkcie de”, “por esti”. Notu la diferencon inter la propra signifo subjunkcia en “Kiel lia patrino ŝi (ne lia patrino) ĉiam dorlotis lin” = en la sama maniero, sed ne estante, kiel lia patrino dorlotus lin, kaj “Kiel lia patrino ŝi ĉiam dorlotis lin”. = en sia funkcio de patrino, estante lia

patrino = “funkcie de lia patrino” aŭ “estante lia patrino”. Ĉar miskomprenoj povas okazi (en la etnaj lingvoj oni ne zorgas pri tiaj miskomprenoj), estas pli logika uzi la alternativojn en la dua signifo.²

2). La nudaj korelativoj ĉiuj estas radikoj ne ŝanĝeblaj nek plimallongigeblaj: la vorto “iam” ne originas en “ia-” + “-m”, aŭ “ial” en “ia+l”. Ili estas ne-divideblaj, ankaŭ pro siaj diversaj signifoj.

Krom la multaj aliaj lingvismaj eraroj en la *Nova P.IV.*, ankaŭ pri ĉi tiu regulo ĝi simple kaj nekompetente imitis erareton faritan de Zamenhof. Ĝi klasigas “ie”, “ies”, ktp. kiel radikojn, dum ĝi strange klasigas “io” kaj “ia” sub unu radiko “i” kun substantiva finaĵo “-o” kaj adjektiva “-a”. Tiu escepto estas nepardonebla, ĉar nelogika nek praktika (notu ke en *Lingvaj Respondoj* Zamenhof dekdufoje favoris logikon kaj nur unufoje malfavoris ĝin). Oni ne povas akcepti tiun escepton, ĉar see:

a. Ĝi estus mallogika, ĉar se “tio” signifas ± “tiu afero”, la adjektiva formo “tia” signifas “de tiu afero”, kaj se “tia” signifas “tiaspeca”, la substantiva formo “tio” signifas “tiu speco”

b. Ĝi ankaŭ estus mallogika, ĉar se oni povas fari “tia” el “tio”, kaj do la radiko estas -i-, oni devas ankaŭ povi fari “ii” (= esti afero: “Ĉu Dio ias vere, aŭ ias nur en nia menso?”) kaj “ie” = “en la maniero de afero”, dum “ie” jam havas alian signifon.

c. Ĉar “tia” signifus “de tiu afero”, ni ne povus uzi ĝin por “tiuspeca” kaj devus uzi nur “tiuspeca” por tiu signifo.

ĉ. Praktike ni devus ankaŭ diri ke “ies” = “i-” + “-es” kaj do “La patres aŭtomobilo”.

d. La escepto estus mallogika, ĉar ĝi egalus al la infinitiva finaĵo “i”.

e. Ĝi formus ankaŭ escepton, ĉar ĝi estus la sola radiko konsistanta el nur unu litero (escepte de la nomoj por la literoj, kaj la finaĵoj); eĉ la afiksoj havas pli ol unu literojn.

f. Ĝi formus krome escepton, ĉar la aliaj korelativoj ne sekvas tiun regulon.

Kvankam ĉi tiu problemo estas nur teoria, ankaŭ la teorio de Esperanto estu ĝusta kaj logika, kaj evitanta esceptojn. □



Por Ridigi Vin



Kial oni nomas nian planedon “Tero” se tri kvaronoj da ĝi konsistas el akvo?

Se ni konsistas 80%e el akvo, kial ni dronas?

Kial kiam oni skribas “disigon” oni skribu ĉion kune, sed “ĉion kune” oni skribas disige?

Kial ni premas pli forte la butonojn de la telekomandilo kiam ĝiaj baterioj estas malfortaj? [El Antaŭen (Hispanio) jan. 2004] □

2. Iuj proponis kaj uzas la vorton “estiel” por ĉi tiu dua signifo, sed ni malrekomendas tion. — db

PROTOKOLO DE LA ĜENERALA KUNVENO DE AEA BRISBANO JANUARO 2004

Bonvenigaj vortoj de la prezidanto.

Pardonpetoj pro neĉeesto: Kep Enderby, Dorothy Enderby, John Gallagher, Jeff Bell, Paul Green, Svetislav Kanaĉki, Penny Vos, Syd Molinson.

Forpasoj: Fay Koppel, Harold Patterson, Marg Ellyard, Elsa Petty, Kay Rutland.

Protokolo de la antaŭa jaro

Protokolo de la antaŭa jarkunveno legita: Proponis Hazel Green, subtenis Kay Anderson. Por: 21, kon: 0, sin: 1.

Propono akcepti la protokolon de la antaŭa jaro sen korekto. Proponis Marcel Leereveld, subtenis Franciska Toubale. Neniu kontraŭ, 1 sindeteno. Unuanime akceptita.

Jarraportoj

Jarraporto de la Prezidanto laŭtlegeta; presita versio disdonita.

Terry Manly menciis aldone la instruadon de Syd Wolifson en Kolegio Wesley dum la jaro, kaj ke Diane Mitchell estis nomita unu el la “instruistoj de la jaro” en Universitato Macquarie.

Kasista raporto. Detala raporto estis prezentita. La membraro plialtiĝis; realiĝis kelkaj malnovaj membroj; 6 membroj estas el Usono. Jonathan demandis pri la kresko de la membraro — ĉu pro somerkursaroj? Franciska demandis el kiuj ŝtatoj venis la novaj membroj. La kasisto respondis ke detaloj mankas, sed ĉiu komencanto estis el Melburno; la kresko ŝajne ne okazis pro iuj specialaj projektoj.

Korespondaj kursoj: Hazel Green raportis pri la korespondkursaro. 8 homoj aĉetis 13 kursojn. 3 homoj faras interretajn kursojn; eble ili ne scias pri loka klubo.

Ekzamenoj: Marcel Leereveld rimarkis ke principe li estas kontraŭ ekzamenoj, sed plenumas tiun servon por AEA. Estas bone prepari por ekzamenoj por stimuli memkonfidon kaj klerecon pri la lingvo. Tamen, malmultiĝas la ekzamenistoj. Ili estas nun nur 5 (Gates, Steele, Bishop, Payne, Leereveld). 3 havas la klerecan diplomon; nur ili rajtas ekzameni por la supera kaj klereca diplomoj. Unu (Steele) loĝas en Nederlando. Helpeksamenistoj por la baza estas Debra, Bob Felby, Edna Turvey kaj Hazel Green. La ekzamena komisiono ankaŭ akceptas ekzamenatojn el aliaj landoj, ekz. Madagaskaro kaj Vjetnamo. Nun la aŭstraliaj ekzamenoj estas oficiale akceptataj en Vjetnamo. Responde al demando de Jonathan, Marcel klarigis ke Vjetnamo tradukas la ekzamenojn en la

vjetnaman lingvon.

Terry Manly proponis akcepton de ambaŭ raportoj. Marcel Leereveld subtenis. Por: 20, kon: 0, sin. 1. La raportoj estis akceptitaj.

Elekto de nova estraro

Malŝarĝiĝis la estraro por permesi la elekton de nova estraro. Proponoj por nova prezidanto estis invitataj. Hazel Green proponis Mateo McGuiren; Colin subtenis. Mateo akceptis la proponon. Franciska proponis Sandor Horvathon, Alan subtenis. Sandor malakceptis, dirante ke li pretus esti vicprezidanto. Franciska opiniis ke la nuna prezidanto agis prezidente dum la kongreso, sed li estis iom malfacile trovebla dum la jaro. Oni voĉdonis: por: 26, kon: 0, sin. 2. Marcelo deklaris Mateo McGuiren prezidanto de AEA dum 2004.

Terry Manly proponis Sandor Horvathon por vicprezidanto. Kay Anderson subtenis. Jennifer Bishop proponis Terry Manlyn, Stephen subtenis. Terry malakceptis la proponon. Mateo proponis Jennifer Bishopon; Diane Lukes subtenis. Terry proponis Franciskan, kiu tuj malakceptis. Estis du kandidatoj por du vicprezidantoj. Marcel proponis ke oni elektu unuope. Sandor elektiĝis por: 26, kon: 0, sin: 0; Jennifer Bishop elektiĝis por: 22, kon: 2, sin: 1.

Franciska proponis John Gallagheron kiel sekretarion. Terry Manly subtenis. Stephen Pitney proponis Terryn, kiu malakceptis. John sciigis letere ke li pretus daŭre agi kiel sekretario, sed li ofte ne povas ĉeesti kunvenojn, kaj li ne ofendiĝus se iu alia estus elektita. Marcel substrekis ke la sekretario devus esti iu kiu povas ĉeesti ĉiujn estrarkunvenojn. La rezulto de la propono de Franciska kaj Terry estis: por: 26, kon: 1, sin: 1. John Gallagher estis reelektita.

Por vicsekretario, Marcel proponis Henry Broadbenton, Franciska subtenis. Henry akceptis la proponon. Terry proponis Franciskan, Hazel subtenis. Franciska akceptis la proponon. Steve proponis Terryn; Alan subtenis; Terry malakceptis. Terry proponis Hazel Greenon, kiu malakceptis. Tial estis du kandidatoj por la posteno. Marcel proponis ke oni voĉdonu pri la propono skribe. Diane subtenis. Hazel Green estis la kontrolisto de la elektado. La rezulto estis: por: 14; kon: 9, sin: 0. Sekve Henry Broadbent estis elektita vicsekretario.

Por kasisto, Jennifer proponis Steve Pitneyn; Betty Broadbent subtenis. Marcel proponis Franciskan, kiu malakceptis. Por la propono de Jennifer: por: 17, kon: 0, sin: 0. Por vickasisto, Marcelo proponis Betty Broadbenton, kiu malakceptis. Jennifer proponis Ken Rollson, kiu sciigis ke li akceptus. Por la propono de Jennifer: 20, kon. 0, sin: 1.

La prezidanto invitis la novan estraron al la podio kaj dankis la antaŭan estraron pro ilia servado dum la pasinta jaro.

Diskutendaj aferoj

Propono ke la tagordo (publikigita skribe sur blanka tabulo malantaŭ la

podio) estu akceptita. Proponis Hazel Green, subtenis Jennifer Bishop. Por: 19, kon: 0, sin: 0.

Diane Lukes raportis ke ŝi baldaŭ reiros al Japanio, kie ŝi instruis la anglan lingvon en granda mezlernejo. Antaŭe ŝi konvinkigis ke ĉiu studento en Japanio volis lerni la anglan lingvon, kaj ŝi instruis ĝin por ke la mondo akiru almenaŭ unu komunan lingvon. Nun ŝi konkludis ke neniam la angla lingvo povus fariĝi lingvo en kiu ĉiu povas esprimi sin egale bone, eĉ post dek jaroj da lernado. Ŝi kontaktis Esperanto-asociojn en 45 ne-angleparolantaj landoj kun propono, ke ili helpu ŝin kontakti homojn kiuj lernadis la anglan lingvon dum pli ol tri jaroj. Ŝi volis sciigi ilin pri la ebleco lerni Esperanton interrete ĉe www.lernu.net. Tamen, nur 5 landaj asocioj volis partopreni. Marcel rimarkis ke oni lernas la anglan lingvon pro praktikaj kaŭzoj; sed oni lernas Esperanton ĝenerale pro idealismo. Ĉu oni ne prefere kontaktu homojn kiuj ne lernas la anglan. Diane diris ke ankaŭ idealistoj lernas la anglan lingvon. Sandor demandis ĉu ne estas la tasko de la landa asocio fari tiajn informojn. Diane respondis ke JEL subtenas la ideon morale, sed ne emas fari ion por helpi ŝin. Jennifer demandis kian helpon Diane ŝatus de AEA. Diane respondis ke ŝia raporto estis por informado. Ŝi nur deziris, ke AEA sciu pri ŝia agado.

Impostaj ŝanĝoj

Steve raportis, ke laŭ novaj reguloj, senprofitaj organizaĵoj devas pruvi ke ili estas karitatecaj, aŭ ili devos pagi imposton pro interezo el mono investita. AEA skribis al la okcidentaŭstralia registaro kun peto pri klarigo, kiel ili traktas organizaĵon kia AEA. En la letero Steve argumentis ke AEA devus esti esceptata, sed ankoraŭ ne ricevis respondon. Se oni ne ricevos respondon, ebla elekto estus fari nenion pli, sed tio verŝajne ne estus saĝa. Sandor demandis kiam la nova regularo komenciĝis. Steve informis ke estis meze de la pasinta jaro. Jonathan demandis ĉu estas ŝtata aŭ tutnacia regularo. Steve respondis ke ĝi estas tutnacia. Li kalkulis ke eble AEA devos pagi imposton je ĉ. \$4000 por la pasinta jaro, kaj similan sumon por la nuna jaro. Alan Grant opiniis ke AEA havas respondecon enketi pri la situacio — nekono de la leĝo ne estas senkulpiĝo. Diane diris ke io simila okazis antaŭ dek jaroj, sed tiutempe Owen Lonagan eltrovis ke AEA estas escepto. Steve formale proponis ke AEA atendu klarigon pri la regularo de la okcidentaŭstralia registraro. Terry proponis ke la membraro akceptu la decidon de la ĵus elektita estraro agi por AEA en ĉi tiu afero. Por: 22, kon. 0, sin. 0.

UEA – Komitatano A

Hazel diris ke Sandor estis la reprezentanto de AEA en la Komitato A de UEA por tri jaroj, sed nun oni devas elekti denove. La reprezentanto devas ĉeesti la UKon, aŭ trovi anstataŭanton. Jennifer Bishop diris ke tiu posteno postulas multe da tempo dum la UK, almenaŭ tri duontagojn, sed ebligas lerni multon pri la internaj agadoj de UEA. Dum la cetero de

la jaro oni ne devas fari multon. Se AEA volas agadi en diversaj UEA kampoj, necesas ke la komitatano A estu la ligilo. Sandor ne planas iri al Pekino, sed li povos reprezenti AEAn ĉe la Litova kongreso. Hazel proponis Sandoron por la posteno. Paŭlo subtenis. Por: 22, kon. 0, sin. 1. Sandor akceptis kondiĉe ke iu anstataŭu lin ĉi-jare en Pekino.

Uzo de fondusoj

Steve raportis ke la konstitucio de AEA ne sufiĉe klare direktas kiel uzi la interezon el la kapitalo de la fondusoj (la uzo de la kapitalo mem de ĉiu fonduso estas klare definita). Nun la interezo simple aldoniĝas al la kapitalo. Steve proponis ke la valoro de la fondusoj povas esti konservata per aldono de mono el la interezo laŭ la CPI, sed ke mono pli ol tiom povus esti enmetita en specialan konton por aliaj celoj. Ĉiu fonduso havas celon, sed la interezo de la fonduso ne havas specialan celon. Marcelo opiniis ke tiu propono estas malmorala. Se iu donacas monon al AEA por iu definita celo, tiu mono inkluzivas la interezon kiu devus esti uzata por la sama celo. Steve respondis, eble jes, eble ne. Marcelo demandis, ĉu ne estas la devo de la nove elektita estraro decidi kiel uzi la heredaĵojn de Fay Koppel kaj Ralph Harry? Jennifer opiniis ke estus ege malfacile subteni novajn projektojn se ili ne estas laŭ la celoj de la donacintoj. Steve diris ke eble \$10,000 dolaroj por novaj projektoj estus havebla se oni uzus la interezon. La kapitalo de la fondusoj ne estus ŝanĝiĝinta; temas nur pri la sumo restanta post aldono al la fondusoj laŭ la CPI por certigi ke la baza valoro de la fondusoj ne malaltiĝu. Se la tuton de tiu sumo oni ne uzis dum la jaro, je la jarofino oni povus remeti la restaĵon en la fondusojn. Marcelo diris ke, laŭ principo, oni ne tuŝu la fondusojn. La heredaĵo de Fay Koppel povus esti uzata por novaj projektoj. Roger Springer opiniis ke mono ne valoras ion se ĝi restadas en konto aŭ fonduso sencele — ĝi estas uzenda. Alan Grant diris ke oni devus unue klarigi pri la imposto. Se oni reinvestas la interezon por mona gajno, ĝi estos impostebla. Diane diris ke la antaŭaj fondusoj ja havis klarajn celojn, sed la novaj, grandaj heredaĵoj ne havas speciale difinitan celon. Marcelo sugestis ke oni daŭrigu la diskuton post decido pri la uzo de la novaj heredaĵoj. Roger kontraŭis la ideon ke la interezo estas necese ligita al la originalaj celoj de la fondusoj. Terry subtenis la proponon de Marcelo, ke oni prokrastu la diskuton ĝis la venonta tago.

Por certigi ke decidoj estas validaj, oni konstatis ke, inkluzivante anstataŭulojn (la prezidanto por Paul Green kaj Sandra por Josh Bell), ĉeestis la kunvenon 23 personoj. Laŭ la konstitucio minimuma kvorumo estas 20. La prezidanto proponis ke la membraro formale voĉdonu pri la propono de Steve: “ke al la kapitalo de la fondusoj estu aldonite el la interezo laŭ la CPI, por ke la valoro de la fondusoj ne malkresku.” Steve proponis, Sandor subtenis. Por: 12, kon: 9, sin: 2. Oni rimarkis ke la subteno de la propono ne estis tre forta. Marcelo proponis: “ke la interezo de la fondusoj estu tute aldonita al la kapitalo de la fondusoj. Oni uzu la heredaĵojn de Fay Koppel anstataŭ la interezo de la antaŭaj fondusoj.”

Franciska subtenis. Por: 11, kon: 9, sin: 2. La amendo estis akceptita. Kompromisa propono estis sugestita: “ke la estraro kreskigu la valoron de la fondusoj iagrade el la interezo dum la jaro”. Por tiu amendo la rezulto estis por: 17 kon: 8 sin: 0. Marcelo proponis ke la heredaĵo de Fay Koppel estu por ĝenerala uzo. Roger demandis, ĉu la heredaĵo de Ralph Harry estis ligita al la antaŭa fonduso Harry. Franciska opiniis ke ĝi estas nova afero. Oni devus starigi du novajn fondusojn, Fay Koppel kaj Ralph Harry. La fina propono estis de Terry Manly, subtenita de Paŭlo: “ke oni metu la monon (Koppel kaj Harry) en unu novan fonduson, kaj ke tiu mono estu uzata por ĝenerala uzo.” Por: 22, kon: 0, sin: 0.

Lernejo Treetops

La estraro ricevis proponon ke AEA donacu al Lernejo Treetops 20 vortarojn (Andrew McLincoln: Pocket Esperanto Dictionary). La 3 vortaroj nun en la lerneja biblioteko ne sufiĉas. La kosto estus \$200 – \$250. Por: 20, kon: 0, sin: 1.

Radiostacio 3ZZZ

La radiostacio 3ZZZ (Svetislav Kanaĉki) petis ke informo pri 3ZZZ aperu en la adresaro de AEA. Terry proponis, Hazel subtenis. Por: 19, kon: 1, sin: 0.

Hazel proponis, Diane subtenis, ke la estraro de AEA petu la redaktoron de ESK enmeti reklamon pri 3ZZZ, se eble en ĉiu numero. Por: 20, kon: 2, sin: 1. 3ZZZ ankaŭ petis pri monhelpo. Franciska substrekis, ke 3ZZZ estas sendependa radiostacio, kiun subtenas abonantoj. Marcelo proponis “ke la estraro favore konsideru de radiostacioj petojn pri financa helpo.” Por: 18, kon: 0, sin: 2.

Kasedoj

Henry Broadbent raportis ke 3ZZZ havas 600 kasedojn de la radio-programoj dum la pasintaj 15 jaroj. Estus dezirinde ke oni konservu ilin por la estonteco. Komerca firmao povas kopii la sonbendojn sur kompaktajn diskojn por \$2000 – \$3000. Post diskutado, la kunveno decidis prokrasti decidon pri ĉi tiu afero, kaj intertempe provos trovi personon kiu interrilatos kun la nacia biblioteko. Henry ankaŭ enketos pri la kosto kaj farebleco de kompaktdiskigo de la arĥivo.

Somerkursaro 2005

La prezidanto petis Sandoron paroli pri la propono okazigi la somerkursaron en Adelajdo en 2005. Sandor diris ke la somerkursaro daŭros dek tagojn, aŭ pli. Steve proponis sep tagojn, de sabato ĝis dimanĉo. Tio signifus nur unu semajnon for de la hejmo. Diskutado inter la membraro opiniis, ke eble sep tagoj estas tro mallonge. Aliaj aferoj diskutitaj temis pri pago al instruistoj kaj loĝloko por junuloj. Marcelo demandis ĉu iu AEA fonduso povus pagi por la luo de la instruĉambroj. Estus bone havi du instruistojn el eksterlando, kiel en Melburno. Tamen, la kosto estas granda. Eksterlandanoj ankaŭ devas pagi vizokostojn kaj aliajn elspez-

ojn. Eble por kelkaj, vizio estas malfacile havebla. Eble unu eksterlanda instruisto estos sufiĉa por propagandaj celoj. Sandor povus peti helpon de la Adelajda urbestro pri ĝemelaj urboj (se instruisto el tia urbo povus veni pere de iu interŝanĝa aranĝo). Finfine oni decidis ke la laborgrupo por la somera kursaro decidu pri la instruistoj.

La prezidanto formale proponis, ke AEA akceptu la inviton de la Adelajda grupo pri la somerkursaro kaj kongreso en 2005. Por: 22, kon: 0, sin: 0.

Stipendio por eksterlanda vojaĝo

Penny Vos kreas materialojn speciale por instrui Esperanton en Montessorilernejoj. Montessori estas internacia instrumetodo, pri kiu Penny estas spertulo. Kolego sendis al ŝi informon, ke en julio ĉi-jare okazos en Japanio konferenco pri “Lingvo kaj Paco”, kiu celas kunligi interesatojn pri internacia komunikado, por ke ili kunlaboru diversmaniere. Lingvoj uzataj dum la konferenco estos la angla kaj la japana. Penny volas ĉeesti la konferencon por informi pri Esperanto kaj prezenti siajn instrumaterialojn. La esperantistoj en Kioto kunlaboros per budeto pri Esperanto kaj prelegoj. La peto temas pri vojaĝokosto. Post diskuto inter la membraro, Marcelo proponis “ke AEA pagu la kostojn de vojaĝo al Japanio (tien-reen), ekonomia klaso, ĝis proks. \$1300.” Por: 18, kon: 0, sin: 2.

Centjariĝo

2005 estos la centjariĝo de Esperanto en Aŭstralio, kaj tio estos grava okazo por propagandi pri Esperanto en Aŭstralio. La somerkursaro en Adelajdo estos la centra agado. La temo de la kongreso estos “100 jaroj de Esperanto en Aŭstralio”.

Propono de Penny Vos pri Esperanto-agado en Narimbula

Ĉi tiu propono estis legebla ĉe la informobudo dum la semajno. Terry plue klarigis. En januaro 2006 okazos en Narimbula festivalo kie oni reklamas kaj allogas homojn lerni diversajn metiojn, lingvojn ktp. Oni povas ricevi monon de la registraro por organizi tian aferon. Penny sugestas ke AEA provizu kursojn kadre de tiu festivalo. Ŝi sugestas kvar nivelojn, kiel en la somerkursaro. AEA ne respondecos pri la organizado de la klasoj, sed instruistoj eble devos trovi (kaj pagi) loĝlokon mem. Paŭlo aldonis ke Penny pretas esti membro de la organiza komitato de tiu festivalo. AEA ne elspezos monon por partopreno, sed devos pagi iom por reklamado. Partoprenantoj en la kursoj pagas al la organiza komitato, kiu provizas loĝadon, manĝaĵojn, salarojn ktp al la instruistoj. Mateo sugestis ke ni konsideru, ĉu ni volas aranĝi la kutiman somerlernejon en Narimbula tiun jaron, kaj plue ĉu AEA volas iri tien por sia kongreso kaj jarkunveno. Franciska diris ke la celoj de la somerkursaro kaj la festivalo ne estas samaj, sed konkurencaj. Ŝi mem partoprenis tiajn aranĝojn, sed Esperanto-kongreso estas io tute alia — ĝi estas loko kie

oni povas paroli nian lingvon dum la tuta tempo. Marcelo avertis ke ni scias nenion pri ĉi tiu festivalo, kaj ne devus ligi nin al io nekonata. Ni helpu al Penny instrui Esperanton en tiu urbo, sed la AEA kongreso kaj somerkursaro okazu en aparta loko. Terry diris ke ni ĉiam havas la problemon kiel allogi homojn al kursoj. Partoprenantoj en la festivalo eble estus allogoblaj al Esperanto-kursoj. Franciska diris ke ankaŭ la malo eblas: esperantistoj estos allogataj al diversaj amuzajoj. Marcelo diris ke oni ne povas fari du aferojn samtempe. Sandor aldonis ke estas malfacile paroli Esperanton se ĉirkaŭe oni vidas homojn dancantajn, kantantajn, ktp. Mateo sugestis ke oni povus aranĝi la kongreson post la festivalo, en Narimbula. Mateo tiam demandis la ĉeestantan membraron ĉu iu kontraŭis la ideon ke AEA helpu al Penny. Neniu kontraŭis. Terry rimarkis ke AEA devas pagi registrajn kostojn. Marcelo diris ke certe ni helpu al Penny, sed eble per unu, du aŭ tri instruistoj. Hazel memorigis ke ni ja devas kongresi ie en 2006, do se Penny invitos nin okazigi la kongreson en Narimbula, tio estus konsiderinda. Aŭ eble estus preferinde decidi la lokon de la 2006a kongreso nun. Franciska diris ke ŝia kompreno estis ke Penny preferus ne nur kursojn, sed kongreson samtempe. Marcelo proponis ke ni respondu al Penny ke la AEA somerkursaro kaj kongreso restu apartaj de la festivalo, sed ke AEA subtenos ĉi tiun aferon per sendo de instruistoj kaj aliaj rimedoj. Hazel rimarkigis ke la grava problemo estas ke AEA devas subskribi la formulon de la registraro por ke oni provizu monon – individuo ne rajtas fari tion. Post longa diskutado la propono de Marcelo estis redifinita: (1) ke la festivalo kaj la AEA somerkursaro kaj kongreso restu apartaj; (2) ke AEA estos la respondeca organizaĵo pri la kurso por komencantoj; (3) ke AEA donos financan helpon por la kursoj kaj prelegoj. Tiu propono estis akceptata por: 14, kon: 0, sin: 1. □

GRANDA ŜANCO HELPI AL INDONEZIO! Jennifer Bishop Vicprezidanto de AEA

Nia plejproksima najbara lando Indonezio, kun grandega nombro da enloĝantoj, dum longa tempo restis sen aktivaj esperantistoj. Danke al Svetislav Kanaĉki, tre aktiva delegito de UEA, kiu donis al mi ricevitan retmesaĝon de s-ro Hazairin R. Junep, AEA kaj Oceania Komisiono de UEA nun havas ligan al Instituto de Kulturoj kaj Religioj en Jogjakarto.

S-ro Junep estas esperantisto sola kiu lernas la lingvon sed volas tuj infekti siajn kolegojn kaj ĉiujn enloĝantojn de sia lando per diskonigo de Esperanto. Tamen mankas al li libroj. Oceania Komisiono same kiel aliaj regionaj komisionoj havas konton ĉe UEA, sed ĝis nun senmonan.

Nun estas granda ŝanco por AEA kaj ĝia monhava membraro kontribui al la diskonigo de Esperanto en nia regiono, ne nur en Indonezio sed kunlabore kun NZEA ankŭ en ĉiuj insulaj ŝtatoj de Pacifika Oceano. Memoru ke ĉiu el tiuj ŝtatoj havas influan voĉdonrajton ĉe UN. Imagu! Per nia kunlaborado

eblos estonte influi la lingvodemokration ĉe UN, per la enkonduko de Esperanto.

Se vi konsentas pri la bezono helpi al s-ro Junep kaj al la tuta agado de Oceania Komisiono, mi petas vin kontakti la Prezidanton de AEA, Matthew Maguire, kun propono rilate la elspezon de mono por ĉi tiu celo. Ankaŭ mi petas vin mem sendu personan monsumon al Stephen Pitney, Kasisto de AEA, indikante “por Oceania Komisiono”. Post unu monato, Steve sendos la grandan monsumon al UEA, kaj S-ro Junep povos komenci sian valoran sed malfacilan kampanjon.

(Menciindas ke ekde la fondo de Oceania Komisiono en Perto, januare 2002, Penny Vos Pym, Vera Payne kaj Matthew Maguire, laboris dum multaj horoj por krei retejon por Indonezio surhavantan la brazilan <cursodeesperanto> tradukitan de Vera en la Bahasa-Indonezian lingvon, kun helpo, pri la enkonduko, de denaska parolanto.) □

EL LA REGIONOJ

NSW: Manley

(Ekstraktita el la jarraporto 2004/02/01, en *Telopeo* marto 2004)

La klubo ankoraŭ kunvenas la unuan kaj la trian sabatojn en la monato ĉe kafejo. Iom pli malgranda grupo kunvenis ĉiujn duan kaj kvaran merkredon en la monato, ĉe la hejmo de iu membro. — Ni elektis Janet McClellandon kiel dumvivan anon de la klubo pro ŝia malavara gastigado de tiuj kunvenoj en sia hejmo dum multaj jaroj. Eunice kaj Berilo finis la reordigon de la biblioteka ŝranko en Esperanto-Domo, kaj ĝi nun estas en bona ordo. — En Oktobro forpasis longedaŭra membro Marion Giles aĝa 92 jaroj. En julio Elsa Peddie forpasis. — Pli feliĉa, kvankam trista, estis la novaĵo ke Ralph Harry memoris la Manlian Klubon en sia testamento, kaj ni uzos la heredaĵon por antaŭenigi Esperanton kaj por honori la vivon de Ralph. — Ni gratulas Kevin Smithon, kiu ricevis la Aŭstralian medalon pro sia granda komunuma laboro. — La klubo bonvenigis plurajn vizitantojn dum la jaro: Vladka Chvatakova el Ĉeĥio; Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia el Bona Espero en Brazilo; Gerry Schavenmaker el Nederlando; Rainer Kurtz el Germanio; studento Justin Alfredson, kiu verkis dokumenton pri Esperanto por sia universitata diplomo; kaj Lilli kaj Lucien Giloteaux el Francio, honoraj membroj de la Manlia Klubo.

QLD: Esperanto-Federacio de Kvinslando: Estraro por 2004:

Prezidanto: David Gould, PO Box 50, Maleny Qld 4552.

Vicprezidanto: Sandra Connors, 78 Wine Drive, Toowoomba Qld 4350

Sekretario: June Perkins, 5 Burgh Ct, Carindale Qld 4152; ronjuneperkins@powerup.com.au

Kasisto: Kay Andersen, PO Box 186, Moorooka Qld 4105; kjand@ozemail.com.au

Vic: Melburna Esperanto-Societo: Estraro por 2004:

Prezidanto: Marcel Leereveld

Vicprezidanto: Ivan Heldzingen

Sekretario: Kam Lee

Kasisto: Heather Heldzingen

La Aŭstralia Esperanto-Asocio

<http://www.esperanto.org.au>

Prezidanto: *Matthew Maguire*, 9 Nioka Rd, Narrabeen NSW 2101

Vicprezidantoj:

Sandor Horvath, 31 Addison Rd, Black Forest, SA 5035. (08) 8297 6249 sandor.horvath@unisa.edu.au

Jennifer Bishop, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122. esperanto@education.monash.edu.au

Sekretario: *John Gallagher*, 81 Lalla Rd, Lillydale Tas 7268. abcetc@ozemail.com

Helpsekretario: **Henry Broadbent**, 63 Kennedy Rd, Somers Vic 3927. (03) 5983 2731. henry_b@peninsula.hotkey.net.au

Kasisto: *Stephen Pitney*, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122. pitney@goldenit.net.au

Helpkasisto: *Ken Rolls*, 31 Miller Crescent, Mount Waverley Vic 3149. kenjohnrolls@yahoo.com.au

Kotizoj: \$Aŭ30 por individuo aŭ klubo (+\$5 for familiano[j] ĉe la sama adreso; \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Sendu vian kotizon al la kasisto.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

<http://www.esperanto.org.nz>

PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035

Prezidanto: *Bradley McDonald*, ĉe la asocia adreso. bradley.m@extra.co.nz

Sekretario: *Howard Gravatt*, ĉe la asocia adreso. hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto: *Jackie Fox*, ĉe la asocia adreso.

Kotizoj: \$NZ40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Sendu vian kotizon al la kasisto.

Esperanto sub la Suda Kruco

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio. ☎ (08) 9641 1937, 📠 (08) 9641 1134. sudakruco@suda.kruco.org

Membroj de AEA kaj NZEA aŭtomate ricevas *ĜK*on. Prezo de pliaj ekzempleroj de *ĜK*: por membroj, po \$Aŭ3.00+poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25+poŝtsendkosto. Mendu de la Libroservo.

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €23,70. Pagu al la konto *ael-w* ĉe UEA, de la Libroservo de Aŭstralia Esperanto Asocio.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas ©2004 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu gazeto estas ©2004 de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata

Ĉi tiu numero de *ĜK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per iMac. La programo uzita estas Mellel. La tiparoj uzitaj estas New Century Schoolbook kaj Helvetica.

Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Bokserp, I.N.K., K.R.A.J.O.N., K.R.E.T.

Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisistoj

Nobla premiito en la fako Fuŝado

Vera Doloro, L.M.K., D.H.A.M.N.

(Lia Multsuferanta Kontrolisto, Dumviva Honora Agoklagotago-Membro Nepra)

Wholly Printed in Australia

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA, Australia

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic 3168, Australia

If undeliverable return reply paid to
D. Broadribb
PO Box 643
York WA 6302
Australia

Esperanto sub la Suda Kruco
Vol. 12, No.3, Majo-Junio 2004

Print Post Approved
PP631048/00005

**SURFACE
MAIL**

**POSTAGE
PAID
AUSTRALIA**